# ESPERANTO

sub la suda kruco

septembro 2023






# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ**
Volumo 30[3] numero 151 septembro 2023

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
**Redaktisto**: Terry Manley
**Provlegantoj**: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else
**Kunordigisto:** Jonathan Cooper
**Kontaktadreso:** **esk@esperanto.org.au**

AEA – ESK
GPO Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

**Abonoj kaj pasintaj numeroj**
*Esperanto sub la Suda Kruco* estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:
AEA: **esperanto.org.au** / **info@esperanto.org.au**
NZEA: **www.esperanto.org.nz** / **esperantonewzealand@gmail.com**

**Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco**
Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, **esk@esperanto.org.au**

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

**Limdato por kontribuoj por la sekva numero**
1a de novembro 2023

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright @ 2023 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380

**SUR LA KOVRILO:** *Ĉe la Movada Foiro en Torino, la 19an de julio 2023: Teodosia dos Reis Ximenes, Mateus de Sena kaj Heather Heldzingen* – Vidu paĝojn 19–23.
Pri aliaj fotoj, vidu paĝon 26.

# ENHAVO


| | |
|---|---|
| Antaŭparolo | 04 |
| Ballarat | 05 |
| Esperanto sur Antarkto | 06 |
| Mi stelojn jungis al revado – recenzo | 07 |
| 108a Universala Kongreso en Torino | 08 |
| Stratarta ekskurso en Melburno | 13 |
| Interkultura Novelo-konkurso | 17 |
| Pli malsekretiĝas la vero pri NIAFoj | 19 |
| Injekto de oksitocino | 23 |

# Antaŭparolo


**TERRY MANLEY**

Ballarat, la urbo kie la venonta somerkursaro de AEA okazos en Januaro 2024, ludis gravan rolon en la evoluo de demokratio en Aŭstralio. Pro la subita kaj granda enfluo de orserĉantoj en la jardeko komence de 1850 kaj la postuloj de reprezentantoj de tiu grupo, la impeto al la voĉdonrajto por ordinaraj virloĝantoj akceliĝis. En 1860, virloĝantoj en iuj kolonioj je la aĝo de 21 ricevis voĉdonrajtojn. Kaj iom poste en 1902 aŭstraliaj virinoj ricevis voĉdonrajtojn. Virinoj en Nov-Zelando ricevis ĝin preskaŭ dek jarojn antaŭe, en 1893. Tial Nov-Zelando kaj Aŭstralio estis inter la unuaj landoj de la mondo, kie loĝantoj gajnis voĉdonrajtojn.

Ne tiel por la indiĝenaj aŭstralianoj, kiel por la indiĝenaj nov-zelandanoj. Maorioj rajtis voĉdoni en 1867, sed la aborigenoj en Aŭstralio devis atendi preskaŭ cent jarojn ĝis 1962 por la sama rajto. Jam en 1840 la maorioj subskribis traktaton kun la britaj invadantoj. Aŭstraliaj aborigenoj ankoraŭ atendas.

Ne ĉiuj en la deknaŭa jarcento en Aŭstralio pensis, ke la aborigenoj estas neglektindaj. En sia libro *Australian Discovery and Colonisation* Volume II (1866), Samuel Bennett skribis en la dua alineo: "En la jaro de la alveno de ŝipestro Phillip (1788), Aŭstralio estis la sola teritorio en la mondo, kun konsiderinda grandeco, kies indiĝena popolo estis ankoraŭ la nedisputeblaj posedantoj de la tero."

Ĉi-jare en Aŭstralio estos referendumo por la rajto de la aborigenoj komenti pri landaj aferoj, kiuj koncernas ilin. Kion ni decidos? Jes au ne?




*Ulurua Deklaro de la Koro*

# Ballarat

**TERRY MANLEY (ARMIDALE)**

Ballarat estas urbo en la centra altebenaĵoj de Viktorio. Ĝia alteco estas 441 metroj. Laŭ la statistikoj de 2021, estis 112 000 loĝantoj. Do Ballarat estas la tria plej granda urbo en Viktorio.

La urbo troviĝas ĉe la bordo de la rivero Yarrowee en la ebenaĵoj okcidente de la Granda Divida Montaro, 105 km nordokcidente de la ŝtata ĉefurbo, Melburno.

La urbo ricevis la nomon de skota setlanto, Archibald Yuille, kiu fondis ĝin en 1837. Yuille establis ŝafbienon tie, kiun li nomis laŭ la origina indiĝena nomo "Bala-Arat", kiu signifas "ripozolokon". Ballarat estas unu el la urboj en Viktorio, kiu evoluis rapide dum la viktoria epoko. Orimpetego en la 1850aj jaroj akcelis la evoluon de la urbo, kaj ĝi ŝanĝiĝis el malgranda ŝafbieno en grandan setlejon. En aŭgusto 1851, oro estis malkovrita tie, kaj la novaĵo ekaltiris proksimume 20 000 orserĉantojn al la loko. Male al aliaj rapidkreskantaj urboj de la orimpetega epoko, la prospero de Ballarat daŭris dum jardekoj pro la konstanta produkto de oro.

En 1854, la Eŭreka Ribelo eksplodis en la urbo. Tiu ribelo estis la nura armita ribelo en la historio de Aŭstralio. Unu el la sekvoj de la ribelo estis la impeto al la voĉdonrajto por viroj, kaj ĝi estas grava etapo en la historio de demokratio en Aŭstralio. La origina ribelflago pendas en la Demokratio-Muzeo en Ballarat. Aliaj lokoj de nacia graveco estas: la Ballarat Botanikaj Ĝardenoj; teatra konstruaĵo, kiu ekzistas ekde 1875; observatorio establita en 1886; kaj la unua memoriga avenuo establita en Aŭstralio post la Unua Mondmilito.

*Daŭras >*



*Fontano Burke kaj Wills, Ballarat*

Ballarat estis deklarita urbo en 1871 kaj ĝia prospero daŭris ĝis la fino de la 19a jarcento, kun rapideco simila al tiu de Melburno kaj Geelong. Poste, ĝia kresko malrapidiĝis kun la forpaso de la orprodukto. En la Olimpiko de Melburno en 1956, Ballarat aranĝis la konkursojn de remado kaj kajakado. La grandurbo estas la ĉefa komerca centro de la centraj altebenaĵoj de Viktorio kaj grava turistloko.

Eblas nutri kaj dorloti kanguruojn ĉe sovaĝbest-parko apud Ballarat. Emuoj ankaŭ vagas libere. Aliaj bestoj en la parko inkluzivas koalojn, vombatojn, krokodilon, pingvenojn kaj tasmaniajn diablojn. Sed oni ne nur vidas aŭstraliajn bestojn. La parko ankaŭ havas paron de sumatraj tigroj.

Monteto Sovereign estas turistejo en Ballarat, montranta iom de la historio de la deknaŭa jarcento. Tie oni povas serĉi orerojn per pato, rigardi forĝiston aŭ radfariston, viziti kvarcminon, kaj partopreni en aliaj turismaj aferoj. E

# Esperanto sur Antarkto

## KATJA STEELE (ADELAJDO)

Ĉu vi eble demandus vin kun surprizo? Jes. Temas pri insulo nomata Esperanto. Ĝi estas unu el la grupo de insuloj kun nomo Zed ĉe Varna, duoninsulo en la Sudaj Ŝetlandaj Insuloj.

Esperanto estas senglacia, roka, kun alteco de 290 metroj. Ĝi etendiĝas sur areo de 56 hektaroj kun maksimuma larĝeco de 900 metroj.

Serĉu ĝin ĉe latitudo 62º 25' 43'' kaj longitudo 60º 10' 23'' (**goo.gl/maps/rMg579tTmdaK8ste9**). La nomon ĝi ricevis de bulgaraj antarktaj sciencistoj, kiuj havas sur insulo Livingston esplorstacion Kliment Oĥridski.

Unue la fokĉasistoj venadis ĉi tien en la frua 19-a jarcento, poste venis la britoj (1968) kaj komencis la kartografiadon, kiun daŭrigis la ĉilianoj, argentinanoj kaj fine la bulgaroj (2009). E

[Ankaŭ ekzistas Insulo Esperanto en Bulgario: **goo.gl/maps/5z2tyvg5j6ERMH6Z7** – sur la rivero Danubo. – *Red.*]



# Mi stelojn jungis al revado – recenzo

## FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)


Dum la maratona kurso de julio 2023 la klaso gvidata de Duncan Charters okazis en la biblioteko de la kastelo Greziljono. Por stimuli la legemon de la ĉeestantoj, Duncan petis, ke ĉiu elektu libron kaj prezentu ĝin al la grupo. Mi opiniis ke romano de Anna Löwenstein tute taŭgas ĉar krom historia intereso, ĝi povus esti la deirpunkto de ofta kaj grava debato pri la uzo de fundamentaj vortoj kontraŭ la uzo de neologismoj. Tamen retenis mian atenton la ruĝa kovrilo de la verko de Mikaelo Bronŝtejn, *Mi stelojn jungis al revado*. Kiam ĝi estis publikigita, mi legis recenzojn kaj finfine venis la oportuno ĝin akiri.

Tiu verko estas miksaĵo de aŭtentaj dokumentoj, reproduktitaj en la lingvo en kiu ili aperis, ĉu la rusa, la angla aŭ Esperanto, kaj historio de la Esperanto-movado en Sovetunio en la komenco de la 20a jarcento, prezentita en romana formo, kun imagitaj roluloj, tamen bazitaj sur realaj esperantistoj. La leganto povas sekvi la pligrandiĝantan famon de Esperanto ĝis la persekutado de la Esperanto-parolantoj kaj la portempa malapero de la movado. Kune kun la libro de Ulrich Lins, *La danĝera lingvo*, kaj la traduko de Kreŝimir Barkoviĉ, *7000 tagoj en Siberio*, ĝi helpas bildigi la etoson de tiu epoko, la entuziasmon sekvitan de elreviĝo kaj teroro.

Plie ĝi povas helpi ankaŭ kompreni la kompleksecon de la hodiaŭa milito en Ukrainujo pro la tiama deziro de la regantoj krei la sovetan homon, novan homon kies etnaj trajtoj estus nuligitaj. Estante SATano, mi pli bone komprenas kio apartigis la du famulojn Drezen kaj Lanti. Mi dubas, ke amo por la sama virino estis la ĉefa kialo, kvankam tio estas bone elpensita spicaĵo en la romano. Mi ĝojas, ke Lanti rifuzis strukturi la asocion laŭ unika pensmaniero, piramida strukturo, kion defendis Drezen, volonte sin submetante al la sovetaj regantoj. Male Eŭgene Adam malfermis ĝin al diversaj pensmanieroj: komunista, anarkiista, sennaciista, pacifista aŭ ekologia, pere de la frakcioj, tiel ke anstataŭ same pensi, la SATanoj prefere komparas siajn ideojn kaj pliprofundigas la kialojn pro kiuj ili atingis la elektitan konkludon.

Se Drezen venkus, SAT certe estus komunista asocio kiel kelkaj – nun maljunuloj – kredis kaj probable malaperus same kiel li. Dank' al la saĝeco de Lanti, ĝi daŭre sekvas sian vojon kun siaj sukcesoj kaj siaj malfacilaĵoj.

La stilo de Mikaelo Bronŝtejn estas plaĉa pro ĝia simpleco, precizeco kaj humuro. E



# 108a Universala Kongreso de Esperanto en Torino

## HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)

Kiam mi unue aŭdis, ke la 2023 Universala Kongreso estos en Italio, mi tuj decidis aliĝi.  Miaj memoroj pri la kongreso en Florenco en 2006 instigis min partopreni. Ĝi estis bone organizita kun ege interesaj preleogoj kaj ekskursoj.

Torino (la nomo signifas "monto") situas en la regiono Piedmont apud la rivero Pado (Po).

### Iom pri la historio de Torino

La unuaj loĝantoj estis keltaj triboj, la "Taurini", verŝajne ĉirkaŭ 200 a.K. La urbo estis parte detruita de Hanibalo en 218 a.K. Ĝi restis relative neĝenata ĝis la Romia Imperio. Kiam alvenis la unua jarcento p.K., Torino fariĝis unue romia armea tendaro kaj poste urbo. Ĝi restis sub romia regado dum pluraj jarcentoj. Poste, kun la kolapso de la Okcident-Romia Imperio, la grandurbon invadis barbaraj grupoj, inkluzive la visigotoj, lombardoj kaj ankaŭ la frankoj.

En la Mezepoko la eklezio multege dominis Torinon. Fine de la 13a jarcento, kiam ĝi estis aneksita al la Duklando de Savojo, la urbo jam havis 20 000 loĝantojn. Multaj el la ĝardenoj kaj palacoj estis konstruataj en la 15a jarcento, kiam la grandurbo estis restrukturata. *Daŭras >*



*La Savoja Palaco*




*La enirejo de la Salono Zamenhof*

Tiam Torino estis sub la regado de la Savoja familio, kiu estis el franca origino. La Duko de Savojo elektis Torinon kiel sian oficán loĝejon, tiel plifirmigante la gravecon de la grandurbo.

Torino iĝis hejmo de multaj grandaj intelektuloj kaj kelkaj lumigataj reformistoj. Tia evoluo post nelonge interrompiĝis per la ekapero de milito kontraŭ Francio. Tiu milito kulminis en 1706 per sieĝo de la grandurbo. En la lastaj de la 1700aj jaroj, Torino estis denove okupata de la franca armeo, ĉifoje sub Napoleono, kvankam tiu periodo de okupo mallonge daŭris.

La 19a jarcento estis tempo de malstabileco kaj tumulto. Socia malkontento en la grandurbo kaŭzis la ribelon de 1821. Meze de la jarcento, Torino komencis havi pli gravan rolon en la kultura kaj politika aferoj de Italio. Efektive, dum tre mallonga tempo, ĝi eĉ estis la ĉefurbo.

De la 1880aj jaroj, la unuaj fandejoj kaj fabrikejoj malfermiĝis en Torino. La industria ekprospero daŭris bone en la 20an jarcenton. Aparte, la Unua Mondmilito estis io bona por la entreprenistoj de la grandurbo. La milito plej favoris tiujn entreprenistojn, kiuj fabrikis aŭtomobilojn. La aŭtomobila kompanio Fiat starigis fabrikejojn en Torino, inkluzive de sia fabrikejaro Lingotto. Antaŭ 1918, Fiat famiĝis en drameca modo kaj nun dungas proksimume 40 000 homojn.

Torino estas hejmo de unu el la plej famaj relikvoj de kristanismo, la Morttuko de Torino, verŝajne tio de Jesuo. Ĝi enhavas kelkajn el la plej elstaraj muzeoj (La Egipta Muzeo estas la dua plej granda en la mondo, post tiu de el Kairo) kaj

arkitekturaj belaĵoj en Italio (Palazzo Reale aŭ la aliaj Savojaj Reĝaj Palacoj, ĉiuj el ili parto de la heredaĵo de Unesko en Italio).

Do, estis bonega elekto de UEA, havi la Universalan Kongreson en tia historia kaj bela urbo. La temo de la kongreso estis *Enmigrado – kunfluo de homaj valoraj*.

La LKK aranĝis multajn interesajn ekskursojn, ekzemple al Genovo, Lago Maggiore, Milano, Albo, Aosta Valo ktp. En la koncertoj prezentis JoMo, Kajto, Birda Flut-triopo, Ĵomart kaj Nataŝa, kaj Bardo sen barbo.

Kiel kutime, ĉiam dum la tagoj, estis informplenaj prelegoj, Internacia Kongresa Universitato, libroservo, prelegoj pri Italio, futbalmatĉo, bankedo, balo kaj KER-ekzamenoj. Pro la multaj eblecoj, oni ĉiam havis problemon decidi kiujn ĉeesti.

Dum la lasta tago la LKK de Arusha donis informon pri la 2024-kongreso en Tanzanio. La unuan fojon en Afriko! Espereble mi renkontos vin tie.



*Sandor Horvath, Deborah McCarney (eks-australiano nun loĝanta en Kimrio) kaj Heather Heldzingen proksime al la kongresejo*





*Dekstrume de supre:*

- *Vido de Torino*
- *Emma Breuninger kaj amiko (kaj lampostango) restas en parko*
- *Malferma ceremonio*
- *Reklkama flago por la kongreso*









*Supre: Katedralo de la Morttuko; Kastelo Rivoli*
*Malsupre: Mark Rodowicz (nova esperantisto de Sidnejo) kaj Heather*



# Stratarta ekskurso en Melburno

## KAM LEE (HOBARTO)

Ekskurso tra kelkaj melburnaj stratoj, famaj pro ties stratarto, okazis dum la Melburna Kongreso 2023.

Marumi Smith estis la ĉefgvidanto por la ekskurso. Marumi ĝoje prelegis pri kelkaj bone konataj stratartistoj, la leĝa situacio pri stratarto, stiloj de stratarto kaj ŝi ankaŭ rakontis interesajn anekdotojn.

Mi estis la vicgvidisto kaj mi iomete prelegis, organizis grupfotojn, kontrolis, ĉu homoj mankas, kaj faris aliajn aferojn.

Interesa estas la historio de stratarto. Fakte estas nur antaŭnelonge, en proksimume la jaro 2000, ke stratarto estis akceptita kiel valora kultura heredaĵo laŭ la urbaj konsilioj kaj ĝenerala publiko.

Diskutita afero estis la diferenco inter stratarto kaj murskribaĉo. Stratarto estas bildbazita kaj havas la leĝan permeson de la urba konsilio. Murbildoj estas ekzemplo de stratarto kaj ĝiaj celoj estas beligi sian lokon kaj subteni la komunumon. Ofte, oni pentras murbildojn por propagandi sociajn, politikajn kaj mediajn aferojn al la ĝenerala publiko.

Murskribaĉo estas vortbazita, neleĝa, kaj ofte asociiĝas kun la vida vandalismo de publikaj propraĵoj kaj konstruaĵoj. Kelkaj de la trajtoj de murskribaĉo similas al la karakteriza stilo kaj bildstilo de tradiciaj tatuoj.

Komence ni trafis tramon al tramhaltejo apud trajnstacio nomata Melburna Parlamento. Dudek esperantistoj kaj mi piediris al la unua celloko, Placo Meyers. Videbla sur flanko de la butiko 7-Eleven estis la fama murpentraĵo, *Jungle Funk*, kiu montras ĝangalon kaj diversajn tropikajn plantojn kaj bestojn. Iuj el al bestoj estas



*Kam en koridoro en Placo Coromandel*

lacerto, papilio kaj kokcinelo. Oni povas vidi multajn belajn florojn kaj verdajn foliojn, kiuj havis interesajn formojn. Escepte de sur la fenestroj, ĉio sur la flanko de la konstruaĵo estis kovrita de la murpentraĵo, kiu estis pentrita de fama melburna stratartisto, Mike Makatron.

Ni piediris ducent metrojn en la direkto al la urbocentro kaj atingis Placon Coromandel. Pentraĵo de vizaĝoj kaj aliaj objektoj estis pentritaj sur la muroj de publika koridoro. Rimarkinda estas la stratarto de diversaj epokoj. Ekstere, estas la murbildo *Indiĝena Lando* pentrita de "ghostpatrol", kies vera nomo estas David Booth, kiu naskiĝis en Tasmanio. Homoj surhavantaj modernajn kaj ne tradiciajn vestaĵojn estis pentritaj.

La tria celloko estis Vojeto ACDC, kiu antaŭ 2004 estis nomata Vojeto Corporation. La nomŝanĝo okazis pro registara omaĝo al la fama aŭstralia muzikgrupo ACDC. Sur la muro estas 3-metra skulptaĵo de Bon Scott, ĉefkantisto de ACDC, pentrita de Mike Makatron en 2018.

Ligita al Vojeto ACDC estas Placo Duckboard, kiu ankaŭ havas sian galerion de stratarto. Videblas la bone konata muro, *Melbourne*, pentrita de brisbana murartisto Steen Jones. Rimarkindaj estas tri tatuaspektaj pentraĵoj de ruĝaj rozoj, kiuj funkcias kiel subskribo de liaj verkoj. Tiaj fabrikmarkaj rozoj aperas sur liaj muropentraĵoj en Dundee kaj Londono, Britio; Queenstown, Nov-Zelando; kaj Plaĝo Bondi, Aŭstralio. Lia tatuaspekta stilo plej probable ekestis pro tio, ke antaŭe li estis tatuisto.

*Daŭras >*



*En vojeto inter Vojeto ACDC kaj Placo Duckboard*




Ni pluen piediris al la kulmino de la ekskurso, la fama Vojeto Hosier, kiu estas tre bone konata pro stratartaj agadoj. Dum 1998, la loko estis malfermita por iĝi artgalerio, pro la iniciato *Urbaj Lumoj*. La loko havas reputacion pro altkvalitaj verkoj, kiuj esprimas politikajn vidpunktojn.

Dum 2020 okazis granda vandalisma ago. Ses homoj portantaj maskojn kolorigaĉis la murojn. Multaj pentraĵoj estis detruitaj.

Dum 2013, la vojeto estis farbita tute nigra kaj poste okazis pentrado fare de 100 murskribaĉaj kaj strataj artistoj. En la sama jaro kun la permeso de la Melburna Urba



*Supre: Vojeto ACDC. inkluzive la murbildo* Melbourne, *verkita de Steen Jones.*
*Dekstre: Vojeto Hosier*

Konsilio, Adrian Doyle pentris la polemikan stratartaĵon, *Malplena*.

Apude estas Vojeto Rutledge, kies stratarto nuntempe ne estas tre impona, sed ĝia stratarta historio certe estis tre interesa. *Infanĉambro Blua*, konsistas el farbado de Vojeto Rutlege per kvindek litroj da blua farbo. La pentraĵo estas propra al Doyle, la pentristo, ĉar ĝi esprimas lian sperton rilate al la perdo de lia familia domo pro agado de banko. Adrian pretendas, ke la blua abstrakta verko altigas la nivelon de stratarto. Tamen kelkaj stratartistoj, kies pentraĵoj estis kovritaj de la blua farbo, estis tre koleraj kaj kontraŭis la bluan verkon. La kontraŭantoj diras, ke malgraŭ la fakto ke stratarto estas nekonstanta kaj evoluas, tamen ekzistas morala leĝo inter artistoj, por eviti la detruon de gravaj bildoj.

Unu publika stratarta komentariisto diris, ke la stratarta komunumo estis kolerega. Li opinias, ke la sinteno de Doyle rilata al publika loko estas senzorga kaj sindorlota. Tamen, li diras, ke la opinio de Doyle estas kuraĝa (eble aŭdaca) kaj certe debatinda afero en la melburna medio.

Interese, unu horon post la fino de la pentrado, Doyle donis al knaboj farbopistolojn por farbi sur la bluajn murojn. Poste la pentraĵo estis kovrita per aliaj murverkoj. Nuntempe oni ne povas facile vidi la bluan farbon, kvankam la stratvojo estis farbita blue almenaŭ dufoje plu.

La lasta celloko estis Vojeto Flinders. Sur muro estas *Dormanta Virino en blanka vesto*, pentrita de Lisa King en 2020. La tre sukcesa stratartisto estas bone konata pro siaj portretoj, kiuj inkluzivas David Bowie, japana virino kaj laŭmodaj ikonaj homoj.

Ni posttagmeze manĝis en kafejo en la Arkado Block. Akvo, kafo kaj diversaj ĉokoladaj kuketoj estis manĝitaj. Anstataŭ manĝi unuspecan pecon de ĉokolada kuko, mi povis manĝi ses pecetojn de diversaj ĉokoladaj kukoj. Konklude, la ekskurso kaj kafumado estis tre memorindaj aferoj. E



*Kongresanoj ĉe la angulo de Vojeto Hosier kaj Strato Rutledge*

# Interkultura Novelo-konkurso

## NICOLE ELSE (SIDNEJO)

La unua INK (Interkultura Novelo-Konkurso) okazis en 2021. La temo de la noveloj devis iel rilati al la kovima viruso. Mi partoprenis kaj estis inter la finalistoj kaj tial mia novelo aperis en la libro *Amo, tuso kaj forpaso*. La titolo de mia novelo estas *Beno aŭ malbeno*.

En 2022 okazis la dua INK. La temo estis "Nokta vojaĝo". Mi ree partoprenis, sed tiu-foje ne estis inter la finalistoj. La libro kun la noveloj de la finalistoj nomiĝas *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj*.

Nun okazas la tria INK. La temo de la noveloj devas esti "La sekreta vivo de miaj najbaroj". La limdato por sendi novelon estas la 30a de septembro 2023. Por pliaj detaloj vidu **bobelarto.ink/eo/konkurso**. Mi komencis verki novelon, sed ankoraŭ ne finis ĝin kiam mi tajpas tion ĉi en aŭgusto 2023. Ankaŭ vi verku! Novelo povas esti relative mallonga rakonto, malkiel romano. (Se vi legas tion post la fino de septembro, ne rezignu pri verkado, certe okazos 4a konkurso.)

# Ĉu mi estas ne normala virino?

Jen finfine la momento alvenis. Estas la 9a vespere kaj Sofia enaviadilas. Antaŭ unu monato ŝi decidis translokiĝi al Aŭstralio. Nun ŝi pasigos la tutan nokton en la aviadilo kaj eĉ iom pli. Ŝi ne plu povas ŝanĝi sian planon. La aviadilo tuj ekflugos. Ĉu ŝi sukcesos dormi aŭ ĉu ŝia menso estos ankoraŭ plenplena de demandoj, duboj, timoj?

Sofia ne kontentis pri sia vivo en Britio. Tial ŝi decidis forlasi Brition en la espero trovi socion kiu pli taŭgas por ŝi. En la aviadilo, ŝi unue komencis legi la libron *Amo, tuso kaj forpaso*, kiun ŝi kunprenis por ne enui en la aviadilo, sed baldaŭ ŝi ne plu sukcesas atenti pri la vortoj en la libro. Ŝi komencas pripensi pri tio kio gravas en socio kaj pri problemoj kiujn ŝi spertis.

Ŝi ne sentas sin sama kiel la aliaj virinoj. Tio kio gravas al ŝi ŝajne ne tiom gravas al aliaj personoj kaj inverse.

Ŝi ja ofte aŭdas, ke gravas la personeco de personoj, ilia konduto, ĉu ili estas afablaj, agrablaj kaj bonkoraj. Ne tiom gravas la ekstera aspekto. Kiel por libro ne gravas la kovrilo, sed la enhavo. Sed... en praktiko preskaŭ ĉiuj diras, ke la ekstera aspekto de persono ege gravas. Gravas surhavi belajn, gladitajn vestaĵojn. Sofia pensas, ke gladi estas perdego de tempo. Ŝi ofte aŭdas, ke unuaj impresoj tre gravas. Ĉu tio ne kontraŭdiras la eldiron, ke la interno de persono plej gravas? Sofia ŝatas praktikajn vestaĵojn, komfortajn ŝuojn sen alta kalkanumo, ŝi malŝatas ŝminkaĵon. Ĉu personoj juĝas ŝin pro tio? Certe, multaj faras. Se vestaĵo estas komforta, ŝi surmetas ĝin ĝis kiam ĝi estas difektita. Kial elspezi monon por aliaj vestaĵoj?

Por multaj personoj tre gravas imponi. Ili tre deziras posedi mansakon, sportŝuojn, brakhorloĝon de fama prestiĝa multekosta firmao. Ili fieras, ili ŝajne volas montri, ke ili estas altvaloraj personoj, kvazaŭ viaj posedaĵoj determinas vian valoron. Sed Sofia pensas, ke ili devus

honti elspezi multe da mono por io kio haveblas multe malpli koste. Ekzistas multaj brakhorloĝoj kiuj perfekte funkcias kaj aspektas bele por malalta prezo. Aliaj en la mondo ne havas sufiĉe da mono por aĉeti medikamentojn, por pagi luprezon, ekzemple. Sofia tute ne volus posedi multekostajn juvelojn. Tute ne per posedaĵoj ŝi deziras imponi. Ŝi deziras pli justan mondon en kiu ne estas tiom granda diferenco inter malriĉuloj kaj riĉuloj.

En la socio honesteco estas ĝenerale alte taksata. Ankaŭ nur teorie, en praktiko vi devas daŭre esti malhonesta kaj mensogi. Ekzemple Sofia memoras pri intervjuo por laborposteno. La kompaniestro demandis kial ŝi deziras labori por tiu kompanio. Ĉu ŝi honeste respondu "Mi ne vere deziras labori por via kompanio, sed mi bezonas monon por vivteni min"? Krome vi daŭre devas esti malhonesta por ne vundi aliajn personojn. Vi devas ŝajnigi, ke vi ŝatas la tute senutilan donacon, ke vi admiras la multekostan aŭton, ke ne gravas se iu stulte perdigis al vi multe da tempo.

Gepatroj ofte diras al siaj infanoj ke respekto kaj ĝentileco tre gravas. Sed praktike ili montras, ke tio kio vere gravas estas la vortoj, ne la sentoj de la infanoj aŭ gejunuloj. Multaj gepatroj devigas infanojn diri "bonvolu" kaj "dankon" ekzemple kaj ne nur "Donu al mi…" kvazaŭ se la infanoj diras tiujn vortojn ili sentos respekton. Sed diri respektemajn vortojn kaj senti respekton kaj dankemon estas io tute alia. Infanoj obeemaj eble konsentos diri respektemajn vortojn, sed ĉu tio signifas ke ene de si ili vere sentas respekton? Tute ne laŭ Sofia. Kial devigi infanon diri dankon, kiam la patrino donas sandviĉon ekzemple? Eble gepatroj povus klarigi, ke fremduloj juĝos ilin kaj do indas diri "dankon" al ili eĉ se vi ne sentas dankemon, sed gepatroj ja konas la infanojn kaj povas juĝi ilin laŭ agoj kaj ne laŭ kiom ofte ili vere diras "dankon". Sofia volonte diras "dankon" kiam ŝi sentas dankemon, sed se oni diras ĝin aŭtomate por tute eta afero, tiam ĝi perdas sian signifon; ĝi ne plu estas eldiro de vera dankemo.

Multaj personoj pensas, ke Sofia estas malĝentila, ĉar ili aldonas signifon al ŝiaj vortoj. Eble ŝi skribis demandon kiel "Kial vi ne respondis?". Ŝi simple deziris scii la kialon. Eble li malsaniĝis aŭ havis speciale multajn okupojn kaj tial ne respondis. Sed la ricevanto interpretis tion kiel aĉan akuzon, fortan kritikon, ke li ankoraŭ ne respondis. Daŭre personoj misinterpretas la vortojn de Sofia kaj misjuĝas ŝin. Iuj eĉ asertas, ke ŝi estas ne normala. Sofia demandas sin, ĉu ankaŭ aŭstralianoj tiel interpretos ŝiajn vortojn aŭ ĉu tio estas tipe brita afero.

Ĉu aŭstralianoj estos same juĝemaj kiel britoj? Ĉu ili juĝos personojn kiujn ili fakte ankoraŭ tute ne konas laŭ la aspekto kaj vestaĵoj? Ĉu almenaŭ la esperantistoj estos malpli juĝemaj kaj provos iom ekkoni la personon antaŭ ol juĝi?

En la aviadilo Sofia pasigis multajn horojn pripensante pri tio kio ĝenerale gravas en socio kaj pri la fakto, ke ŝia pensmaniero ne estas sama kiel tiu de la plejmulto.

Finfine venas la anonco, ke la aviadilo baldaŭ surteriĝos. Sofia apenaŭ sukcesis dormi. Kvankam ŝi lacas, ŝi estas ekscitita pri sia nova vivo en fora lando.

Ĉu Sofia faris bonan decidon translokiĝi? Nu, baldaŭ ŝi povos konstati ĉu la vivo en Aŭstralio ja estas pli bona ol la vivo en Britio.

Evidente Sofia ne estas normala. Sed kio vere estas normaleco? E

# Pli malsekretiĝas la vero pri NIAFoj

## JOANNE JOHNS (MELBURNO)

Mi suspektas, ke tre malmultaj homoj ĉirkaŭ la mondo ne aŭdis pri la urbo Roswell, Nov-Meksiko en Usono, kaj la incidento, kiu okazis tie en julio 1947. Tiu eble ne estis la unua incidento pri NIFOj (Ne-Identigitaj Flugantaj Objektoj) sed ĝi certe popularigis la fenomenon. Kaj ne gravaj estas viaj kredoj pri la vero de tiu afero, ĉar laŭ mi, la mondo ĵus vidis eĉ pli gravan eventon.

En julio 2023 la Usona Kongreso organizis publikan diskuton pri NIAFoj (Ne-Identigitaj Anomaliaj Fenomenoj – la nova nomo por NIFOj, pro ilia ŝajna kapablo vojaĝi trans pli ol aero). La evento komenciĝis, grave, per la enĵurado de tri atestantoj. Tio signifas ke, se montriĝus ke ili mensogis, ili povus trovi sin en malliberejo.

Do kiuj estas la atestantoj? Jen kelkaj detaloj:

**Leŭtenanto Ryan Graves** – iama F/A-18-piloto por la Usona Mararmeo.

**Majoro David Grush** – iama Ĉefa Inform-Oficiro kun la Nacia Geospaca Informa Agentejo kaj Ĉefa Teknika Konsilisto pri NIAFaj aferoj.

**Komandoro David Fravor** – emerita Eskadroestro kiu laboris kiel Mararmea Aviadisto dum 18 jaroj.

La diskuton ĉeestis multaj kongresanoj de ambaŭ politikaj partioj, kaj notinda estis la manko de kvereloj kaj nekonsentado; ĉiuj ŝajnis esti unuanime kaj vigle serĉante la veron. En la enkonduko, la prezidento substrekis la gravecon de malkaŝeco kaj respondeco pri NIAFoj, plendante ke la nuna sistemo de sekreteco malebligas




*Bildo de videaĵo montranta renkonton inter Usona Maramea F/A-18 kaj nekonata objekto*

kongresan kontroladon de fondusoj, instigas spekulativadon de la publiko, kaj erodas fidon je la institucioj, kiuj respondecas por protekti homojn.

Resumete, la atestantoj atestis jene:

**Ryan Graves** atestis ke:

- NIAFoj estas en nia aerospaco, kaj estas ege subraportataj.
- ekde 2021, ĉiuj filmetoj pri NIAFoj estas klasifikitaj "sekretaj".
- en 2014, post plibonigoj de radaraj sistemoj, pilotoj ekvidis nekonatajn objektojn – poste estis vidataj ankaŭ per aliaj sensiloj, infraruĝaj (IR) sistemoj, kaj propraokule.
- dum trejnmisio apud Virginia Beach, du F/A-18 aviadiloj estis apartigitaj per NIAFo. Ĝi estis priskribita kiel nigra kubo en travidebla sfero, 1,5- 4,5 metrojn larĝa kaj 15 metrojn for de la aviadiloj. La eskadro prezentis sekurecan raporton, sed estis nenia oficiala agnokso pri la incidento.
- pro la manko de oficiala respondo pri NIAFoj, li fondis la grupon Usonanoj por Sekura Aerospaco, kaj pli ol 30 atestantoj jam raportis kaj preskaŭ 5 000 (nun preskaŭ 10 000) usonanoj aliĝis.
- la raportantoj en Usono estas ĉefe komercaj pilotoj, kaj raportas NIAFojn kiuj faras neklarigeblajn movojn, kiel 90 gradajn turniĝojn aŭ J-hokojn.
- apud Vandenberg Aerarmea Bazo, en 2003, grupo de kontraktuloj de Boeing vidis ruĝan kvadraton, 90 metrojn larĝan, alproksimiĝi de super la maro, ŝvebi dum ĉirkaŭ 45 sekundoj super lanĉejo, kaj poste rapidi al la montoj. Okazis dum la vespero alia simila incidento.

**David Fravor** atestis ke:

- en 2004, la USS Nimitz (aviadila ŝipo) estis apud Kalifornio, trejnanta kun la USS Princeton. Dum flugado, oni diris ke la trejnado estas paŭzigita, kaj ke ili devas iri okcidenten. Oni dum du semajnoj estis vidataj objektoj, kiuj venis de pli ol 80 000 futoj (spaco) ĝis 20 000 futoj, restis dum horoj, kaj reiris supren.
- alveninte al la loko, kvar pilotoj vidis, propraokule, blankan objekton kun la formo de "Tic Tac" (mentaĵo, kiu aspektas kiel malgranda kapsulo), kiu havis nek flugilojn nek rotorojn. Ĝi moviĝis tre rapide. Laŭ la instrumentoj kiuj registris ĝin, ĝi vojaĝis 60 mejlojn en malpli ol minuto (preskaŭ kvaroble pli rapide ol F/A-18). Estis ankaŭ aliaj objektoj.
- la objektoj blokis APG-73 radarsistemon.
- la objektoj povis resti senmovaj en kategorio-4 ventoj, kaj poste akceliĝi ĝis rapideco de 1,2 maĥoj.
- laŭ tio, kion li vidis, li taksas ke homoj ne povus travivi la G-potencojn de tiaj movadoj.
- la trajtoj de la objektoj ege superis ion ajn, kion ni havis tiam, havas nun, aŭ havos en la venontaj dek jaroj. Laŭ li, iliaj kapablecoj estas fakte preter nia nuna materiala scienco.
- neniu esploris la incidenton en tiu tempo.
- filmetoj estas videblaj, kaj en 2017 estis artikolo en la New York Times pri la afero.

**David Grusch** atestis ke:

- li respondecis pri analizado de NIAFoj kaj "trans-mediaj objektoj".
- en 2019, la Direktoro de la NIAF-Taskogrupo petis, ke li identigu ĉiujn programojn pri speciala alireblo (SAPoj) kaj kontrolita alireblo (KAPoj), kaj ke li havis la sekurecan permeson fari tion. Dum tiu serĉo, li estis informita pri mult-jardeka programo pri ekstrakto kaj

invers-inĝenierado de kraŝitaj NIAFoj, sed oni rifuzis al li aliron al tio, kiam li petis.

- li donis informon al la Oficejo pri Klarigado de Ĉiu-Mediaj Anomalioj (angle: All-Domain Anomaly Resolution Office), sed ricevis nenian respondon.
- en majo 2022, li iĝis denuncanto, kaj donis multe da informoj al la Inspektisto Ĝenerala de la Informa Komunumo (IĜIK) pri la aserto, ke la usona registaro funkcias en sekreteco ekster kongresa kontrolado rilate al NIAFoj. Ĉi tiu informo estas bazita sur atesto de kredindaj individuoj kiuj provizis fotojn, oficialajn dokumentojn, kaj klasifikitan parolan ateston.
- li scias pri la lokoj, kie la registaro konservas NIAFojn, kaj donis tiun informon al la IĜIK.
- li havas kolegojn kiuj estis vunditaj, kaj de homoj en la registaro kaj per NIAFoj
- laŭ lia scio, la registaro ankaŭ posedas kadavrojn de nehomaj pilotoj. *Daŭras >*




*David Grusch ĉe la Usona Subkomitato de la Ĉambro de Reprezentantoj pri Nacia Sekureco, la Landlimo, kaj Eksterlandaj Aferoj, la 26an de julio 2023*

Ĉiuj tri taksis, ke la NIAFoj povus esti minacaĵoj, povus esti esplorantaj niajn kapablojn, kaj ke estas indikiloj ke ili interesiĝas pri niaj nukleaj kapabloj. Ankaŭ, ke se ili ekbatalemiĝus, ni havus nenian kapablon defendi nin.

Ankaŭ grava, estas tio kio ne estis dirita. Kiam oni demandis "Ĉu vi kredas, ke la registaro havis kontakton kun inteligentaj eksterteranoj?" Grusch respondis, "Tio estas io, kion mi ne povas diskuti en publika loko." (Notu, ke li ne diris "Ne".)

Fakte, ofte dum la atestado, Grusch ne povis respondi pro sekureco, sed diris multfoje, ke li povus doni la informon se ili povus renkontiĝi en speciala sekura loko, konata en la angla kiel SCIF (Sensitive Compartmented Information Facility). Ĝis nun tiu renkontiĝo estis blokita per aliaj partoj de la registaro.

Kompreneble estas bezono por sekreteco pri aferoj, kiuj koncernas nacian sekurecon, ekzemple pri la kapabloj de usonaj aviadiloj kaj sensiloj, sed laŭ S-ro Graves, la objektoj mem ne bezonas esti klasifikitaj. Fakte, povus esti sekureca risko se pilotoj ne plu kapablus distingi inter amikoj kaj malamikoj pro neidentigitaj objektoj.

Interese, Grusch ankaŭ klarigis kial li uzas la terminon "ne-homa inteligenteco" anstataŭ "eksterterano". Laŭ li, la fenomeno estas tre kompleksa, kaj li ŝatas havi "malferman menson" pri ĝia origino. Li ankaŭ parolis pri la ebleco, ke ili estas inter-dimensiaj.

Je la fino, la prezidento substrekis la gravecon de la amaskomunikiloj, kaj ke ili raportu pri la kunveno sed ankaŭ esploru kaj raportu pri NIAFoj en la komunumo. Bedaŭrinde, post la kunveno estis malmulte da raportado pri ĝi de la amaskomunikiloj.

Post kiam mi rigardis tiun gravan eventon mi plu esploris. Certe, estas multe da falsaĵoj kaj mensoguloj, sed inter tiuj estas sufiĉe da kredindaj, altrangaj homoj, kiuj diras la saman aferon: Ni ne estas solaj.

Tion mi povas kredi senprobleme. Krom tio, estas tiom da strangaj teorioj pri kiuj mi ankoraŭ dubas. Ĉu nazioj havas bazon ĉe la fora flanko de la luno? Ĉu eksterteranoj difektigas bovojn? Ĉu homoj estis prenitaj kaj testitaj? Ĉu NIAFoj desegnas en kampoj?

Aŭ, ĉu la usona registaro, antaŭ jardekoj, trovis kaj kopiis nehomajn teknologiojn, kaj nun sekrete kaj ege rapide flugas ĉirkaŭ la mondo laŭvole? Ĉu ĝi havas novajn ilojn pri energio, kiuj povus doni al la mondo senpagan elektron kaj kiuj solvus poluadon, sed kaŝas ilin por protekti la grandegan enspezon de la olea kaj gasa industrioj? Ĉu ĝi mem disdonis stultajn teoriojn kiel tiujn suprajn por certigi, ke ni neniam kredus la etan veran parton? Kaj, eĉ pli perturba eblo: ĉu en la estonteco la usona registaro uzos siajn kopiitajn NIAFojn por ataki nin, kaj kulpigi la "eksterteranojn", por instigi nebezonatan spacmiliton (simile al ilia falsbaza milito en naftoplena Irako kontraŭ "armiloj de amasdetruado")?

Mi esperas nur, ke la nehomaj inteligentecoj estas sufiĉe inteligentaj por scii ke ne ĉiuj homoj estas batalemaj kaj monavidaj, kaj ke tiuj eksterteranaj (aŭ interdimensiaj) amikoj havas la kapablojn facile malpotencigi tiujn kiuj ne traktas la teron, aliajn homojn, la bestojn, kaj niajn vizitantojn, kun respekto kaj amo. ∎

Spektu la Usonan Kongresan Aŭskultadon pri NIAFoj: **youtu.be/KQ7Dw-739VY**

Spektu la malsekretigitajn filmetojn de NIAFoj: **youtu.be/auITEKd4sjA**

Lernu pli pri NIAFoj: **uap.guide**

# Injekto de oksitocino

**KAM LEE (HOBARTO)**

Teatraĵo nomita *Injekto de oksitocino* estis montrata dufoje dum la Melburna Kongreso 2023. La amuza intrigo kaj koncepto de la prezentado estis verkita de Marumi Smith.

La rolantoj de la teatraĵo estas vojaĝanto, vojaĝantino, la Diablo, Anĝelo kaj anĝelhelpanto. Dum la enkonduko de la teatraĵo, Marumi informas la spektantaron pri la hormono, oksitocino, kies efikoj rilatas al amo, socia aglutino, fido, romantika alligiteco, gepatro-infana ligo kaj aliaj. Nuntempe, sciencistoj esploras la cerbajn efikojn de oksitocino, rilate al manio, anoreksio, anksio kaj deprimiĝo.

Nun la teatraĵo komenciĝas! Du vojaĝantoj sidas sur seĝoj en parko kaj ili feliĉe babilas. Ili konversacias pri eventoj en la Melburna Kongreso 2023 kaj pri la venonta UK en Torino, Italio.

La Diablo, ne antaŭvideble, venas al la parko, kriegas kaj peze stamfas siajn piedojn. Li tenas per la dekstra mano draŝilon kaj la pilko kovritaj de pikiloj furioze moviĝas en cirkla vojo. Li forĵetas la danĝeran draŝilon en la aeron kaj tiam la pilko rapide ruliĝas kelkajn metrojn sur la tero.

La Diablo haltas piediri kaj minace prezentas publikan predikon pri malamo kaj detruo al la mondo. La du vojaĝantoj estas la solaj aŭskultantoj kaj ili estas ŝokitaj. Ili deziras foriri el la parko, sed bedaŭrinde, la ŝanco eskapi jam forpasis kaj ili estas kaptitaj.

La Diablo advokatas publikan ekzekuton de la turistoj, kiuj povas eskapi morton, se ili gajnas kontraŭ proponita defio de la Diablo. La Diablo diras, ke antaŭ la ekzekuto, li intencas malrapide piediri ĉirkaŭ ilin kvinfoje. Ĉirkaŭiro daŭras unu minuton. Dum ĉiu ĉirkaŭirado, la vojaĝanto havas oportunon telefoni personon por helpo.

Tamen la helpanto(j) devas veni antaŭ la fino de la kvina ĉirkaŭirado por batali kontraŭ la Diablo por la libero de la vojaĝantoj.

La du homoj akceptas la kondiĉojn de la defio.

Dum la unua ĉirkaŭiro de la Diablo,



vojaĝanto tuj telefonas sian fidindan najbaron, kiu preskaŭ ĉiufoje povas helpi lin. La najbaro estas informata pri la situacio kaj komence la konversacio ŝajnas optimisma. Konklude la najbaro respondas, ke la peto estas tro ambicia, ĉar li povos ĉeesti en la parko nur post kvardek minutoj, kiam estos tro malfrue por savado. La unua ĉirkaŭiro de la Diablo finiĝas kaj li laŭte anoncas, ke nur kvar ĉirkaŭiroj restas.

La Diablo komencas la duan ĉirkaŭpiediron kaj vojaĝanto decidas telefoni trioble nul, kiu estas la telefonnumero por peti helpon dum krizo. Dudek sekundoj forpasas sed la telefona trafiko estas tro okupata kaj la sola rimedo estas lasi voĉan mesaĝon al la mesaĝregistrilo.

La tria ĉirkaŭpiediro de la Diablo komenciĝas, kaj vojaĝanto telefonas proksiman policejon. La vojaĝanto diras al policisto, ke li estas kaptita de diablo, kiu intencas baldaŭ mortigi lin kaj amikinon.

La policisto respondas ke diabloj ne ekzistas, kaj li ne havas tempon por respondi al ŝercaj telefonpetoj. Post kelkaj minutoj de kverelado, la vojaĝanto koncedas malvenkon kaj ĉesas la diskuton.

La Diablo laŭte anoncas la finon de la tria ĉirkaŭiro kaj entuziasme komencas la kvaran fojon de la cirkla piedvojo. Anksio ekaperas sur la vizaĝo de la vojaĝanto, kies manoj ektremetas.

Ĉi-foje, li telefonas al amiko, kiu vendas pafilojn. Li informas la amikon pri la situacio kun la Diablo. Post malgranda atendotempo, la amiko respondas, ke li opinias, ke la situacio estas ne vera. Eĉ se la situacio estus vera, la amiko opinias, ke li ne vendas efikan batalilon kontraŭ diabloj, kvankam liaj pafiloj estas uzeblaj kontraŭ zombioj kaj vampiroj.

Komenciĝas. la kvina kaj lasta fojo de la cirkla piediro, kiu daŭras maksimume du minutojn. La du vojaĝantoj preĝas por helpo kaj por prepari sin por neevitebla morto.

La fino de la kvina cirkla piediro venas. La Diablo estas iom amuzata pri la spirita metodo elektita de la vojaĝantoj kaj li komencas prepari la ekzekuton. Ne antaŭvidite, Anĝelo venas el la ĉielo por savi la du senkulpajn senesperajn vojaĝantojn.

*Daŭras >*



La Diablo fanfaronas, ke li facile kaj rapide disrompos tiajn fortojn de boneco. Tamen la antaŭvido de la Diablo ne ĝustos, ĉar la Anĝelo havas bonegan reputacion por gajni kontraŭ malbonuloj.

Dum la komencaj minutoj okazas furioza egala batalo per glavoj inter la Anĝelo kaj la Diablo. Okazas pezaj svingoj kaj strategiaj puŝoj de la metalaj bataliloj, sed neniu gajnas avantaĝon.

Post kvin minutoj da energiaj atakoj kaj retretoj, la Diablo laciĝas kaj li komencas perdi sian kunordigadon kaj lertecon.

La Anĝelo eksaltas kaj sukcese pelas glavon en la bruston de la Diablo. La demona besto estas severe vundita kaj povas moviĝi nur tre malrapide. Tenante injektilon de oksitocino, la Anĝelo ŝanĝas strategion kaj sukcese injektas la hormonon en la Diablon, kiu poste perdas konscion kaj falas sur seĝon.

Post duonminuto, la Diablo ekvekiĝas kaj en duonkonscia stato parolas ne pri detruo sed pri la amo al beboj, boneco de homaranismo kaj tiel plu. La Diablo ŝanĝiĝas al bonulo, do la vojaĝantoj kaj la Anĝelo festas. Je la fino, la aktoroj kaj spektantaro kantas ukrainan kanton pri paco kaj espero.

Interesa estas la ŝanĝo en la rolularo inter la unua prezentado kaj dua prezentado de la teatraĵo.

En la unua prezentado, Gary, la edzo de Marumi, feliĉe akceptis la rolon de la Diablo. Ĉar mi konis Marumion longan tempon, ŝi invitis min roli kiel la vojaĝanto. Larissa, amikino de Marumi, akceptis la rolon de vojaĝantino. Larissa antaŭnelonge eskapis el la milito en Ukrainio kaj ŝi fariĝis amikino de Marumi pro intereso pri masaĝ-terapio. Larissa bonvole konsentis diri kelkajn malgrandajn esperantajn frazojn en la teatraĵo. Marumi rolis kiel la Anĝelo kaj Mitzie Kawano-Lobb, filino de amikino de Marumi, ludis la rolon de la feino (helpanĝelo).



Post la unua prezentado, Larissa, la vojaĝantino estis infektita de kovimo kaj bedaŭrinde devis resti hejme por resaniĝi. Gary, la Diablo, perdis sian voĉon pro laŭta trouzado de sia voĉo dum ekzercado kaj la unua prezentado de la teatraĵo.

Mi sciis, ke se ne estus aktoroj por la roloj de la Diablo, Anĝelo kaj la du vojaĝantoj, la dua prezentado ne okazus. Do la serĉo por rolantoj komenciĝis.

Mi petis Giles Thompson kaj Caitlin McClusky dum kongresa vespermanĝo kaj ni diskutis pri la afero. Mi proponis, ke, por plifaciligi iliajn rolojn, ili povos aktori kiel la du vojaĝantoj kaj mi povas ŝanĝi mian rolon al la Diablo. Ili pripensis, kaj post unu tago konsentis partopreni en la teatraĵo. Pro tio la dua prezentado estis savita kaj sukcese okazis.

Dankoj estas donitaj al la homoj, kiuj partoprenis en la teatraĵo. E




*Monteto Sovereign, Ballarat*

**Aŭstralia Kongreso de Esperanto kaj Somerkursaro 2024**

Okazos inter la 5a kaj 14a de januaro 2024,
ĉe Federation University, Mt Helen, Ballarat, Viktorio.

Pli da informo: **esperanto.org.au/kongreso**

## Agnoskoj pri fotoj

**4** The Uluru Statement, **ulurustatement.org**

**5** 'Mattinbgn'**,** Wikimedia Commons (GFDL)

**6** Insuloj Zed, inkluzive Insulo Esperanto, Antarkto. 'Apcbg', Wikimedia Commons (CC BY-SA 3.0)

**7** Franciska Toubale

**8, 9** Heather Heldzingen

**10** (Nekonata)

**11** Heather Heldzingen

**12** Katedralo de Morttuko – Heather Heldzingen ; Kastelo Rivoli – Heather Heldzingen**;** Mark Rodowicz kaj Heather – Sandor Monostori

**13** Caitlin McClusky

**14** Kam Lee

**15** Supre: Caitlin McClusky; Malsupre: Helen Palmer

**16** Kam Lee

**19** U.S. Department of Defense

**21** Usona Federacia Registaro, senkopirajta, per Wikimedia Commons

**23, 24** Petro Johns

**25** Kam Lee

**26** Matt Zhang per Unsplash

**28** Esther Parris kaj aliaj ĉe la Aŭstralia Esperanto-Kongreso kaj Somerkursaro, Brisbano, 2017. Petro Johns

# Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

**Committee Members:**
Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



# New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@gmail.com
0800 350 781

Bradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

**Committee Members:**
Erin McGifford, Josuo Moss, Stephen Epstein

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

# What *is* this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

### What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

### Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

